

KATALUNA ESPERANTISTO

MONATA ESPERANTA GAZETO

DUA EPOKO - JARO I^a : JUNIO 1921

KATALUNA ESPERANTISTO

MONATA ESPERANTA GAZETO

OFICIALA ORGANO DE "KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO"

JARKOTIZO: 5 PESETOJ

REDAKCIO KAJ ADMINISTRACIO: CARMÉ, 30 - BARCELONA

REDAKTOROJ

JAUME GRAU, ĈEF-REDAKTORO

S. ALBERICH JOFRÉ

ARTUR DOMÈNECH

ROMÀ GUARDIET

ĈIUJN VENDREDOJN, JE LA 10^a VESPERE, OKAZAS REDAKCIA KUNVENO.



Nia devizo: *Maro estas gutaro*

KATALUNA ESPERANTISTO

OFICIALA ORGANO DE

Kataluna Esperantista Federacio

Redakcio kaj Administraĉio :
Carme, 30 : BARCELONA

Grava dokumento

21 Membroj de la Franca Akademio de l' Sciencoj
subskribas Rezolucion por Esperanto



RE altsignifa estas la decido de tiuj famaj kaj kompetentaj sciencistoj, favora al la uzado de Esperanto ĉe la sciencaj rilatoj, kaj ĝi certe helpos altiri la atenton de ĉiaj intelektuloj al nia lingvo.

Ni represas ĉi sube la interesan dokumenton :

La subsignintoj, membroj de la Akademio de l' Sciencoj, konvinkitaj, ke la alpreno de la helplingvo Esperanto en la internaciaj rilatoj havus konsekvencojn de nemezurebla graveco vidpunkte de la progreso de l' sciencoj kaj de iliaj aplikoj; ke ĝi permesus etendi la elradiadon de la franca scienco eksteren kaj, per tio, la intelektan influon de nia lando,

esprimas la deziron :

1. ke la instruado de tiu ĉi lingvo, ĉefverko de logiko kaj simpleco, estu enkondukata, almenaŭ kiel nedeviga, en la oficialaj programoj de la sciencaj klasoj de ĉiuj instruejoj;

2. ke, en la internaciaj kongresoj, ĝi estu akceptata kiel oficiala lingvo, egalrajte al naciaj lingvoj ĝis la momento, kiam la sperto pruvos, ke ĝi kapablas fariĝi ilia sola oficiala lingvo;
3. ke la atento de la direktoroj de sciencaj aŭ teknikaj eldonejoj estu altirata al la intereso, kiun prezentus al ili la uzado de tiu ĉi lingvo en iliaj publikaĵoj destinitaj por la eksterlando;
4. ke de nun la sciencistoj kaj teknikistoj preparu sin por uzi ĝin en siaj rilatoj kun siaj eksterlandaj kolegoj kaj konigu poste al ili, ke ili estas pretaj uzi ĝin;
5. ke komisiono estu nomata por prepari kaj ellabori la vortarojn de la puraj sciencoj en Esperanto, kaj ke la teknikaj societoj estu invitataj fari la samon koncerne ilian specialecon.

D'Arsonval, Professeur de physiologie au Collège de France.

Daniel Berthelot, Président de la Ligue française de l'Enseignement et de la Société de Navigation aérienne.

Bigourdan, Astronome à l'Observatoire de Paris, Président de la Commission internationale de l'Heure, membre du Bureau des Longitudes.

Gaston Bonnier, Professeur de botanique à la Sorbonne.

Général Bourgeois, Sénateur, Ancien Directeur du Service Géographique de l'Armée, membre du Bureau des Longitudes.

C. Breton, Député, Ancien Ministre.

J. Carpentier, Fabricant d'Instruments de précision, membre du Bureau des Longitudes.

Charpy, Directeur général adjoint de la Société des Forges et Aciéries de la Marine à Homécourt.

Costantin, Professeur de botanique au Museum d'histoire naturelle.

Deslandres, Directeur de l'Observatoire d'Astronomie Physique de Meudon, membre du Bureau des Longitudes.

Amiral Fournier, Président de la Société d'Océanographie de France, membre du Bureau des Longitudes.

P. Janet, Directeur du Laboratoire Central d'Electricité, Président de la Société française de Physique.

C. Lallemand, Inspecteur général des Mines, Directeur du Service du Nivellement général de la France, membre du Bureau des Longitudes.

Maurice Leblanc, Président du Comité Electro-Technique international, Ancien Président de la Société internationale des Electriciens.

Lecornu, Inspecteur général des Mines, Professeur à l'Ecole Polytechnique.

Lindet, Professeur à l'Institut Agronomique, Ancien Président de la Société d'Encouragement à l'Industrie nationale.

Lumière, Administrateur de la Société des Etablissements Lumière, à Lyon.

Prince de Monaco, Président de la Section d'Océanographie de l'Union internationale de Géodésie et de Géophysique.

Charles Richet, Professeur à la Faculté de Médecine, membre de l'Académie de Médecine.

Général Sebert, Président du Conseil d'Administration des Forges et Chantiers de la Méditerranée.

Fernand Vidal, Professeur à la Faculté de Médecine, membre de l'Académie de Médecine.

Pri la morto de hundeto



Ĝi perdis malgrandan buldogon. Ĝi estis apenaŭ plenuminta la sesan monaton de sia mallonga ekzistado. Ĝi tute ne havas historion. Ĝiaj inteligentaj okuloj malfermiĝis por rigardi la mondon kaj por ami la homojn; tuj poste ili refermiĝis kun la maljustaj sekretoj de la morto.

La amiko kiu ĝin donacis al mi donis al ĝi eble kiel antifrazon la tre neantaŭviditan nomon PELLÉAS. Kial mi estus ĝin malbaptinta? Ĉu malfeliĉa, amanta, karesema kaj lojala hundo senhonorigas nomon de homo aŭ de fantazia heroo?

PELLÉAS havis grandan frunton larĝan kaj potencon, similan al tiu de Sokrato aŭ de Verlaine; kaj sub nazeto nigra kaj kuntirita kvazaŭ malkontentiga jeso, larĝaj oreloj pendantaj kaj simetriaj faris el ĝia kapo speĉon de minaco masiva, obstina, pensema kaj triangula. Ĝi estis bela kiel bela natura monstro severe alkonformiĝinta al leĝoj de sia speco. Kaj kia rideto de atenta rigardo, de nekoruptebla naiveco, de sindona subiĝo, de senlima dankemo kaj de tuta forgeso lumigis, je plej malgranda kareso, tiun adorindan maskon de malbeleco! El kie devenis, ja, tiu rideto? Ĉu el okuloj naivaj kaj kortuŝitaj? Ĉu el oreloj levitaj al paroloj de la homo? Ĉu el frunto kiu larĝiĝis por kompreni kaj ami, el kvar etaj dentoj, blankaj kaj elbordigantaj, kiuj gaje radiis sur la nigraj lipoj, aŭ el mallonga vosto rapide balanciĝanta por atesti la intiman kaj varman ĝojon kiu plenigis malgrandan estaĵon feliĉan renkonti ankoraŭ unu fojon manon kaj rigardon de la dio al kiu ĝi sin donis?

PELLÉAS naskiĝis en Parizo, kaj mi portis lin en la kamparon. Dikaj, grasaj kruroj, senformaj kaj nesolidaj ankoraŭ, kondukis malfirme tra la nesploritaj vojoj de ĝia nova ekzistado ĝian kapon grandegan kaj gravan, platan kaj kvazaŭ surŝarĝitan de pensoj.

Ĝi aspektis tiel, ĉar ĝi komencis—tiu kapo sendanka kaj iom malgaja, simila al tiu de troŝarĝita infano—la premegantan laboron kiu pezas sur ĉiu cerbo en komenco de l' vivo. Ĝi bezonis, dum malpli ol kvin aŭ ses semajnoj, penetrigi kaj organizi en si kontentigan reprezentadon kaj konsciadon de la universo. La homo, kun helpo de tuta scienco de siaj prauloj kaj de siaj fratoj, uzas tridek aŭ kvardek jarojn por skizi tiun ekkomprenon aŭ pli ĝuste por amasigi ĉirkaŭ ĝi, kvazaŭ ĉirkaŭ palaco de nuboj, la konscion de nescienco leviĝanta; sed la humila hundo devas ĝin elklarigi en kelke da tagoj, kaj tamen antaŭ okuloj de dio ĉionscianta; ĉu ĝi ne havas preskaŭ saman pezon kaj saman valoron kiel la nia?

Decis, do, studi la teron kiun oni povas grati kaj fosi, kaj kiu foje kaŝas surprizaĵojn: terajn kaj blankajn vermojn, talpojn, musojn, grilojn; decis ĵeti kontraŭ la ĉielon, kiu tute ne interesas ĉar nenio en ĝi estas manĝebla, unu solan rigardon kiu nuligos ĝin unu fojon por ĉiam; koni la herbon, la admi-

rindan kaj verdan herbon, la elastan kaj freŝan herbon, kampo por kuradoj kaj ludoj, kuŝejo bonvola kaj senlima.

Decis ankoraŭ fari, konfuzi, milojn da konstatoj urĝaj kaj kuriozaj. Decis, ekzemple, sen alia gvido ol doloro, taksu altecon de objektoj de kiuj oni povas sin ĵeti en la malplenon, konvinkigi ke estas vane persekuti preterflugantajn birdojn kaj ke oni ne povas surgrimpi arbojn por atingi la katojn kiuj vin malŝatas; distingi sunbanatajn pecojn kie dormo estas agrablega el tiuj ombraj kie oni frostotremas; rimarki kun miro ke pluvo ne falas interne en la domojn; ke akvo estas malvarma, nelogebla kaj danĝera, dum fajro estas de malproksime bonefika, sed de proksime terura; observi ke herbejoj, farmaj kortoj kaj foje vojoj estas loĝataj de gigantaj estaĵoj kun minacantaj kornoj, monstroj eble bonpensaj, certe silentemaj, kiujn oni povas flari sufiĉe nediskrete, sed kiuj, tamen, ne montras sian kaŝintencan; elpruvi, sekve de humiligaj kaj penigaj spertoj, ke nepermesate estas obei sendistinge ĉiujn leĝojn de naturo en loĝejo de la dioj; kompreni ke kuirejo estas la privilegiita kaj plej agrabla loko en tiu dia restadejo, kvankam oni ne povas tie loĝi kaŭze de la kuirstino, rimarkinda sed ĵaluza potenco; certigi ke pordoj estas gravaj kaj kapricaj voloĵoj kiuj foje feliĉigas, sed kiuj pli ofte hermetike fermitaj, mutaj kaj rigidaj, fieraj kaj senkoraj, restas surdaj al ĉiuj petoj akcepti, unu fojon por ĉiam, ke la esencaĵoj bonoj de l'ekzistado, la nekontesteblaj feliĉoj, ĝenerale entenataj en marmitoj kaj kaseroloj, estas ne atingeblaj; scii ilin rigardi kun indiferenteco pene akirita, sin ekzercigi en ilia ignorado dirante al si ke ili estas sendube sakraj objektoj, ĉar sufiĉas nur tuŝeti ilin per pinto de lango respektplena por elĉenigi, magie, la unuaniman koleron de ĉiuj hejmaj dioj....

Kaj kion, do, pensi pri la tablo kie tiom da nekompreneblaj aferoj okazas? pri ironiaj brakseĝoj kie malpermesate estas dormi, pri pladoj kaj teleoroj kiuj enhavas jam nenion kiam oni konfidas ilin al vi? pri lampo forĉasanta la mallumon kaj pri fajrujo forĉimiganta la malvarmajn tagojn?... Kiom da ordonoj, kiom da danĝeroj, kiom da malpermesoj, kiom da problemoj, kiom da enigmoj kiujn oni devas klasigi en la surŝargita memoro!... Kaj kiel akordigi ĉion ĉi kun aliaj leĝoj, aliaj enigmoj pli vastaj kaj pli imperiaj, kiujn oni portas kun si, en sia instinkto, kiuj aperas kaj malvolvigas de horo al horo, kiuj venas el fundo de la tempo kaj de la raso, invadas la sangon, la muskolojn kaj la nervojn, kaj fariĝas subite pli nerezisteblaj kaj pli potencaj ol doloro, ol ordono mem de la mastro kaj la timo al morto? Tiel, citante nur unu ekzemplon, kiam la horo dormi estas soninta por la homoj, ĉiu estas retiriĝinta en sian niĉon, ĉirkaŭita de mallumoj, de silento kaj de la timiganta soleco de la nokto. Ĉio dormas en domo de la mastro. Oni sentas sin tre malgranda kaj tre malforta antaŭ la ĉesto de mistero. Oni scias ke la ombro estas plena de malamikoj kiuj ŝoviĝas kaj atendas. Oni suspektas arbojn, venton kiu pasas, kaj lunajn radiojn. Oni volus kaŝi kaj forgesigi sin

VIII^{aj} Internaciaj Floraj Ludoj



A originoj de la Floraj Ludoj devas esti serĉataj en la mezepoko, kiam la kataluna lingvo atingis sian plej altan brilon. Tiam tiu ĉi festo estis partoprenata de la trobadoroj kaj ĝi okazis kun granda soleneco en la reĝaj palacoj meze de la tutlanda nobelaro.

Pro diversaj politikaj kaŭzoj malsupreniris iom post iom la kataluna lingvo kaj kompreneble la Floraj Ludoj sekvis saman vojon ĝis malapero, ĉar vere oni povas diri ke tiom defalis la kataluna lingvo ke ĝi ne plu estis deca esprimilo por spiritaj aferoj. Post kelkaj centjaroj dum kiuj fakte ĝi estas nur parolata, komencas iu poeto balbuti per ĝi siajn kantojn, sed la lingvo restas ankoraŭ plena de neperfektaĵoj.

Tiam, je la duono de la XIX.^a centjaro, kelkaj entuziasmuloj de la patra lingvo restarigas sur novaj reguloj la antikvajn Florajn Ludojn kaj ĉiujare estas alvokitaj la poetoj al tiu festo. La rezultatoj de tiu entrepreno estas mirigaj: lingvo de ĉiuj forlasita renaskiĝas plena de vivo; ĝian purigadon komencas la literaturistoj kaj ĝin finas gramatikistoj, ĉar ĉiuj intelektaj homoj estas trenataj al tiu movado, kiu ebligis hodiaŭ la uzon de la kataluna lingvo por ĉiuj elmontraĵoj de la homa scio.

La organizintoj de la V.^a Internacia Kongreso de Esperanto en Barcelono (1909) prave opiniis ke kvankam la stato de Esperanto ne estis feliĉe la sama, ĝi multe povus gajni se oni enkondukus tiun feston en nia movado kaj ili tion faris okaze de la supredirita kongreso. Bedaŭrinde, la festo ne tute enradikiĝis en la esperanta vivo, eble ĉar oni konsideris ĝin kiel plian literaturan konkurson kaj ĝia *interna ideo* estis nekomprenata de multaj.

«Oni ne komprenis—diris nia kara amiko S-ro Pujulà en sia parolado dum la II.^{aj} Floraj Ludoj—ke en tiu festo la boneco de la verkoj estas konsiderinda, sed ne la ĉefa afero; ke la pli-malpli granda riĉeco de la premioj estas tute flanka detalo, kiu ne povas aŭ ne devas naski emocijn; oni ne komprenis ke la objekto de ĝia celo estas la komunio de Popolo kaj Poeto ĉirkaŭ la altaro de Beleco kaj Poezio».

Efektive, tia estas la festo kataluna. Oraj kaj argentaj floroj estas la ordinaraj premioj; el tio devenas la antikva nomo de FLORAJ LUDOJ. Tamen la plej grava el la premioj estas natura floro kiu rajtigas la gajninton elekti Reĝinon de la Festo. Ni konservis tiun ĉi premion en la esperantaj Ludoj ĉar oni ne povas donaci premion pli valoran por la spirito ol floro oferota al fraŭlino kaj ŝin iganta simbolo de la Beleco en festo de Poezio.

Imagu nun la feston. La plej bela salono de la urbo ornamita per flagoj kaj girlandoj. La enurbaj aŭtoritatuloj kaj la juĝintaro eniras en ĝin por prezidi la feston kiun malfermas la urbestro. La nomo de la laŭreato per la na-

Junio 1921 Zwickau Seite 64/65
Kataluna Esperantisto

tura floro estas laŭte sciigata kaj la gajninto, akompanata de ĉiuj eminentuloj, eliras por alkonduki la Reĝinon elektitan. Ŝi eniras de la brako de la poeto, sekvata de Kortego de Amo konsistanta el kelkaj fraŭlinoj same kondukataj de la aŭtoritataj moŝtoj, dum ludas marŝon muzikistaro kaj aplaŭde salutas la publiko. La Reĝino okupas sian tronon kaj la poeto legas la premiitan verkon. Siavice estas alvokataj ĉiuj gajnintoj kiuj ricevas la premiojn de la manoj de la Reĝino kaj la festo finiĝas per altsenca parolado de la Prezidanto. Kun la sama soleneco kiel por la eniro la Reĝino kaj Kortego forlasas la salonon.

Jen rapide priskribitaj la festo kaj ĝia celo. La «Kataluna Esperantista Federacio» kredis ke estus domaĝe ke tiu festo malaperu el la esperanta movado kaj prenis sur sin la taskon organizi jam sep konkursojn. Ili donis al ni sufiĉe bonajn verkojn por nin konvinki ke ni estas sur bona vojo.

La nunan jaron, ĝi organizas la VIII.^{ajn} Florajn Ludojn laŭ la sekvantaj reguloj. Ni esperas ke la sukceso estos pli granda ol la antaŭaj tial ke la malhelpaĵoj de la militaj tempoj malaperis kaj tio permesos ke nia festo estu partoprenata, krom de la katalunaj, de multnombraj eksterlandaj samideanoj, kio igos la nunajn Florajn Ludojn plene internaciaj.

Al la esperantistaj verkistoj:

La Komitato de la VIII.^{aj} Internaciaj Floraj Ludoj vin salutas kaj invitas partopreni en la jenaj konkursoj:

ORDINARAJ TEMOJ

ORIGINALAJ TEKSTOJ:

- I.—Originala versaĵo kantanta *Amon*.
- II.—Originala *Ama* verko en prozo.

TRADUKITAJ TEKSTOJ:

I.—Traduko de la kataluna versaĵo «El Misteri de la Prada» originale verkita de Joan M.^a Guasch (Vidu la Martan numeron de K. E.)

II.—Traduko de la kataluna prozaĵo «L'Escarment» originale verkita de Josep Carner (Vidu la Martan numeron de K. E.)

EKSTERORDINARAJ TEMOJ

I.—Premio de Deputita Moŝto D-ro Narcís Pla i Deniel, konsistanta el 100 pesetoj, al la plej bona verko priskribanta popolan tradicion.

II.—Premio de la Grupo «Semo» de «Ateneu Enciclopèdic Popular»: 25 ptoj. al plej bona traduko de la artikolo de D. Martí i Julià «La Patria Universal».

III.—Premio de la Grupo «Barcelona Stelo»: 50 ptoj. al plej bona teatraĵeto taŭga por propagando.

IV.—Premio de la Societo «Nova Sento»: 50 ptoj. al la plej bona versaĵo adaptebla je muziko, inspirita laŭ la «interna ideo», taŭga kiel himno de la Societo «Nova Sento». Ĝi devos konsisti el 2 strofoj enhavantaj 12 liniojn ĉiu.

V.—De «Unió Deportiva», el Girona. Premio: 100 pesetoj. Temo: «Sporto». (La premiita verko iĝos propraĵo de «Unió Deportiva»).

VI.—De S-ro Casià Costal, Direktoro de la «Normala Lernejo por Instruistoj» el Girona. Premio: 25 ptoj. Temo: Verko pri la infana psikologio.

VII.—De Lia Moŝto Markizo de Camps. Premio: Artobjekto. Temo: Laŭvola.

VIII.—De la Grupo «Ĝirona Espero». Premio: 50 ptoj. Temo: Versaĵo al la arbaro «La Devesa» el Girona.

IX.—De la Societo «Marte», el Girona. Premio: Artobjekto. Temo: Laŭvola.

X.—De Lia Moŝto Vicari Capitar de Girona. Premio: 50 ptoj. Temo: Kolekto de fidindaj sciigoj pri la Katolika esperanta movado en la mondo.

XI.—De la Moŝta Katedrala Kanonikaro, el Girona. Premio: 50 ptoj. Temo: Ritma traduko de la latina himno de Pentekosto «Beata nobis gaudia», laŭ Breviarium Romanum.

XII.—De la Rektora Moŝto kaj Klaŭstro de la Tridentina Seminario de Girona. Premio: 50 ptoj. Temo: Enkonduko de Esperanto en la pastrajn seminariojn.

XIII.—De «Grupo Escolar», el Girona. Premio: 25 ptoj. Temo: Esperanto kiel rilatigilo ĉe la internacia studentaro.

XIV.—De la «Unión Gremial y Patronal», el Girona. Premio: 30 ptoj. Temo: Grava utileco de Esperanto por la Komerco.

XV.—De «Coliseo Imperial», el Girona. Premio: 25 ptoj. Temo: Laŭvola.

XVI.—De «Schola Orpheonica», el Girona. Premio: Artobjekto. Temo: Laŭvola.

XVII.—De «Instituto General y Técnico», el Girona. Premio:

50 ptoj. Temo: Radikoj greko-latinaj kiujn enhavas la Esperanta vortaro.

XVIII.—De la Komerca Ĉambro de Girona. Premio: 25 ptoj. Temo: Laŭvola.

XIX.—De Lia Moŝto la Provincestro de Girona. Premio: Artobjekto. Temo: Esperanto kiel spirita rimedo por la solvo de la internaciaj konfliktoj.

XX.—De la Ekscelenca Urbeŝtraro de Girona. Premio: 50 ptoj. Temo: Laŭvola.

Pli da eksterordinaraj premioj eble estos ankoraŭ, aljuĝotaj al laŭvolaj temoj.

Inspiron al ĉiuj por la gloro de nia Literaturo!

Eduard KÜHNL, *prezidanto*.—D-ro Josep CASANOVAS.—Josep GRAU.—Teo JUNG.—Julio MANGADA.—Estanislau PELLICER, *sekretario*.

Barcelona, Majo 1921.

NOTOJ

I.—La aŭtoro de la plej bona originala versaĵo (*originalaj tekstoj I*) ricevos la volumon pri «Albrecht Dürer» eldonitan de D-ro Nuchter enhavantan 53 bildojn de la famkonata desegnisto. La aŭtoroj de la ceteraj premiitaj verkoj (*originalaj tekstoj II, tradukitaj tekstoj I, II*) ricevos binditan ekzempleron de la verko «Sinjoro Tadeo» pola epopeo de Adam Mickiewicz, majstre tradukita de Antoni Grabowski.

Krome estos donata al ĉiu laŭreato bela atesta diplomo.

II.—Al la aŭtoro de la plej bona teksto (versaĵo aŭ prozaĵo) el la kvar ordinara premiitaj verkoj, la Komitato aljuĝos la *Naturan Floron* kaj la rajton elekti Reĝinon de la Festo.

III.—La verkoj prezentotaj devas esti verkitaj en Esperanto.

IV.—La Festo de la VIII.^a Floraj Ludoj okazos en Girona dum la IX.^a Kongreso de la KATALUNA ESPERANTISTA FEDERACIO la proksiman Oktobron.

V.—Al la manuskriptoj, —kiuj devas esti ricevitaj antaŭ la 15.^a de Aŭgusto 1921 de la Sekretario S-ro Estanislau Pellicer en la sidejo de la Kataluna Esperantista Federacio (str. Carme, 30, Barcelona)—oni devas aldoni devizon, kaj sendi en koverto fermita, kiu portos la saman devizon, la nomon kaj adreson de la verkinto.

VI.—Manuskriptoj ne estos resendataj, eĉ se ili alvenis post la datolimo por akcepto de verkoj.

VII.—La membroj de la Juĝontaro partoprenos en neniuj konkursoj.

VIII.—La Komitato publikigos la verdikton per KATALUNA ESPERANTISTO kaj per la esperantaj kaj enlandaj gazetoj kiuj bonvolos ĝin represigi.

sin detenante de spiro. Tamen necese estas vigli; necese estas, ĉe la plej malgranda ekbruo, eliri el sia retiriĝejo, kontraŭstari nevideblon kaj akre rompi la imponantan silenton de stelaro eĉ kun risko nur sur sin altiri la malfeliĉon aŭ la krimon mallaŭtan. Kiu ajn estas la malamiko, eĉ se ĝi estas homo, tio estas frato mem de la dio kiun oni devas defendi; necesas ataki lin blinde, sursalti lin sur gorgon, planti dentojn, eble sakrilegiajn, en la homan karnon, forgesi prestiĝojn de mano kaj voĉo similajn al tiuj de la mastro, neniam silenti, neniam forkuri, neniam allasi sin al tento, kaj, perdiĝinte en la nokto senhelpe, plilongigi heroan alarmon ĝis lasta sopiro. Jen la granda devo heredita de prauloj, devo esenca kaj pli forta ol morto, kiun la volo mem kaj kolero de la homo ne povas detrui. Ĝi estas tuta nia humila historio ligita al tiu de la hundo dum niaj unuaj luktoj kontraŭ ĉio spiranta, ĝi estas tuta tiu humila kaj tremiganta historio kiu renaskiĝas ĉiun nokton en la primitiva memoro de nia amiko en la malbonaj tagoj. Kaj kiam, en niaj pli sekuraj loĝejoj, okazas al ni kun nekonvena fervoro ĝin puni, ĝi direktas al ni rigardon kun miranta riproĉo, kvazaŭ esprimante al ni ke ni eraras, kaj ke, se ni malatentas la ĉefan kondiĉon de la interligo kiun ĝi faris kun ni en la tempo kiam ni logis en kavernoj, arbaroj kaj marĉoj, ĝi restas al ĝi fidela malgraŭ ni staras pli proksime al eterna vero de la vivo kiu estas tiel plena de logiloj kaj de malamikaj fortoj.

Sed kiom da zorgoj kaj kiom da studoj por atingi saĝan plenumadon de tiu devo! Kaj kiel ĝi komplikiĝis de post la tempo de silentaj grotoj kaj de grandaj dezertaj lagoj! Ĝi estis tiel simple, tiam, tiel klare kaj facile! La soleca kaverno malfermiĝis ĉe flanko de monto kaj ĉio proksimiĝanta, ĉio moviĝanta ĉe la horizonto sur ebenaĵoj aŭ arbaroj, estis la ne pridubebla malamiko!... Sed hodiaŭ, oni ne povas scii.... Necesas akordiĝi al civilizacio kiun oni malaprobas, agi kvazaŭ komprenante milon da nekompreneblaj aferoj.... Tiel, ŝajnas evidente ke de nun tuta mondo ne plu apartenas al la mastro, ke lia propraĵo konsentas al neklarigeblaj limigoj.... Estas, do, absolute necese ekzakte koni kie komenciĝas kaj kie finiĝas la sakra posedaĵo. Kion oni devas toleri, kion oni devas malhelpi? — Jen vojo kie ĉiu, eĉ malriĉulo, haŭsas rajton trapasi. Kial? — Oni ne scias; ĝi estas bedaŭrinda fakto sed kiun oni devas akcepti. Feliĉe, jen estas kontraŭe, bela vojeto, kaŝita vojeto, kiun povas neniu surpaŝi. Tiu vojeto estas fidela al sanaj tradicioj; grave estas ne malatenti pri ĝi; tra ĝi eniras la malfacilaj problemoj en ĉiutagan vivadon. Ĉu vi volas ekzemplon? — Oni dormas trankvile ĉe suna radio kiu kovras per perloj moviĝantaj kaj ludetemaj sojlon de l'kuirejo. Porcelanaj potoj amuziĝas sin puŝante kaj renversante reĉproke sur bordo de bretoj ornamitaj per paperaj denttondaĵoj. Kupraj kaseroloj ludas dismovante lummakulojn sur muroj blankaj kaj glataj. Kantetas patrino forto dolĉe lulante

tri marmitojn dancantajn kun feliĉego, kaj tra malgranda truo heliganta ĝian ventron, por moki la bonan hundon kiu ne povas alproksimiĝi, eligas tro ofte fajran langon. Horloĝo kiu tediĝas en sia kverkoligna ŝranko atendantte ke ĝi sonorigu solenan horon de manĝo, balancigas sian grandan orumitan umbilikon kaj muŝoj kvazaŭ senatente pikas orelojn. Sur brilanta tablo kuŝas kokido, leporo, tri perdrikoj, apud aliaj aĵoj nomataj fruktoj aŭ legomoj: verdaj pizoj, fazeoloj, melonoj, vinberoj, kaj kiuj nenion valoras. La kuiristino malplenigas arĝentan fiŝegon kaj ĵetas la internaĵojn (anstataŭ ilin fordoni!) en balaajan kestegon. — Oh! la balaaja kesto! neelĉerpebla trezoro, juvelo de la hejmo! Oni havos sian parton delikatan kaj kaŝakiritan, sed ne konvenas elmontri sciadon pri ĝia loko. Estas severe malpermesite iel ĝin tuŝi. Homo tiel malpermesas multajn agrablajn aferojn, kaj vivo estus malgaja kaj tagoj neelporteblaj se necese estus obei ĉiujn ordonojn pri ŝrankoj, pri kelo kaj manĝoĉambro. Feliĉe li estas malatenta kaj ne longe rememoras pri ordonoj de li fordonitaj. Oni trompas lin facile. Oni atingas sian celon kaj oni faras kion oni volas, kondiĉe ke oni scias paciencie atendi la horon. Oni estas submetita al homo kaj li estas sola dio; sed tamen oni havas ja ankaŭ sian moralon personan, precizan, neperturbeblan, kiu laŭte proklamas ke malpermesitaj agoj iĝas justaj se oni efektivigis ilin sen scio de la mastro. Tial, do, fermu ni atentan okulon kiu vidis. Ni ŝajnigu nin dormantaj kaj revantaj pri la luno. — Jen! oni frapas milde sur bluan fenestron kiu rigardas al ĝardeno. — Kio do estas? — Nenio, krataga branĉo venanta rigardi kion oni faras en kuirejo. — Arboj estas scivolaj kaj ofte agititaj; sed oni ne kalkulas sur ilin, oni povas al ili nenion riproĉi, ili estas nerespondaj, ili obeas al vento kiu tute ne havas principojn. — Sed kio? — Mi aŭdas paŝojn!... Vigle, orelo levita kaj nazo antaŭen!... Ne! ĝi estas panisto proksimiĝanta al palisaro, dum leteristo malfermas pordeton antaŭ la tilia vico. — Ili estas konitaj, bone.... Ili alportas ion, oni povas saluti ilin; kaj vosto, singardema, balanciĝas du aŭ tri fojojn, kun protektanta rideto. Alian fojon! Kio ankoraŭ? — Veturilo haltas antaŭ perono. Ha, tio estas pli grava!... La problemo estas komplika. — Decas antaŭ ĉio insultegi la ĉevalojn, malhumilajn bestegojn, ĉiam dimanĉe vestitajn kaj ĉiam ŝvitantajn, kiuj neniam respondas. Dume oni observas strabe desaltantajn personojn. Ili estas bele vestitaj kaj ŝajnas plenaj de certeco. Sendube ili estas sidiĝontaj ĉe tablo de la dioj. Decas boji sen akreco, kun nuanco de respekto, por montri ke oni plenumas sian devon, sed ke tion oni faras kun inteligenteco. Tamen oni havas ĉiam ian suspekton, kaj dorse de gastoj, kaŝe, oni flaras kun obstino kaj inteligentula mieno, kun celo malkovri kaŝatajn intencojn.

(*Daŭrigota*)

MAURICE MAETERLINCK

El franca lingvo tradukis

MARIAN SOLÀ

* * *

Eterna Di', Sinjor' de mirindaĵoj:
por ĉi tiuj graciaj delikataj
de Vi verŝitaj sur miljaran teron
per nur unu rigard' de kontentiĝo,
por la steloj helvivaj, malgrandetaj,
por la neĝo sur supr', rozkoloriĝa,
por l'akvo de laget', iĝinta blua,
por la arbeto, kiu ŝajnas tremi,
por la floroj ĉe herbo, tiel timaj,
por la ĉarmo de pomoj vintrotempaj,
por sonor' de novaĵoj roznuancaj,
por la vojetoj preskaŭ nevideblaj,
por la fumovualo de vespero,
faru, Sinjor', ke l'amatino estu
mistera, bela, delikata, milda,
ke ne forkuru, kiam mi ŝin kisos,
ke la kapon ŝi turnu hontbedaŭre
esti lasinta la patrinan sinon,
ke estu blanka kaj estiĝu ruĝa,
ke, timigita de folibrueto,
ankoraŭ pli enbraken ŝi rifuĝu
de la amanto, kiun ŝi evitis.

JOSEP CARNER

El kataluna lingvo tradukis

JOSEP GRAU CASAS

Oficiala Parto

KUNVOKITA de la Direkta Komitato de K. E. F., la 8.^{an} de majo, kunsidis la Konsulta Komitato por pritrakti la projekton de bazoj por la Iberia Esperantista Konfederacio, kiun ni aludis en nia lasta numero, kaj studis diversajn aspektojn de tiu problemo, al kiu la Dua Diskuta Kunveno de Esperantistoj en Zaragoza dediĉos sian plej grandan atenton.

La projekto, kiun por studo ni dissendis al ĉiuj grupoj, estis ŝanĝita ĉe diversaj paragrafoj kaj enkonduko konforme al la deziro de la ĉeestintaj delegitoj kaj leteroj ricevitaĵoj de diversaj grupoj, kiuj trafis konsciante la gravecon de la starigota kunliganta organizaĵo, montris tre atentindajn konsilojn, kiuj certe fariĝos realaĵo ĉe la nomita kunveno.

Ni varme rekomendas al grupoj, kiuj ne respondis nek sendis delegiton al tiu kunsido, ke ĉiufoje kiam ili ricevos demandon pri la problemo, bonvolu ne forgesi esprimi almenaŭ letere sian opinion por ke la rezultato estu ĉiam kiel eble plej konforma al la penso de la plimulto.—LA SEKRETARIO, S. ALBERICH JOFRÈ.

VIII^{aj} Internaciaj Floraj Ludoj

EKSTERORDINARAJ TEMOJ

XVII.—De «Instituto General y Técnico», el Girona. Premio: 50 ptoj. Temo: Radikoj greko-latinaj kiujn enhavas la Esperanta vortaro.

XVIII.—De la Komerca Ĉambro de Girona. Premio: 25 ptoj. Temo: Laŭvola.

XIX.—De Lia Moŝto la Provincestro de Girona. Premio: Artobjekto. Temo: Esperanto kiel spirita rimedo por la solvo de la internaciaj konfliktoj.

XX.—De la Ekscelenca Urbeŝtaro de Girona. Premio: 50 ptoj. Temo: Laŭvola.

Pli da eksterordinaraj premioj eble estos ankoraŭ, aljuĝotaj al laŭvolaj temoj. Oni sendu la verkojn al la Sekretario de la VIII^{aj} Internaciaj Floraj Ludoj, S-ro Estanislau Pellicer, Carme, 30, Barcelona.

Ni aperigas suplementon al tiu ĉi numero de «Kataluna Esperantisto», enhavanta ĉiajn detalojn pri la nunaj Floraj Ludoj. El ĝi ni presigis grandan kvanton da ekzempleroj, abunde dissendotaj al ĉiuj landoj por igi nian Literaturan Feston plene internacia.

ENLANDA MOVADO

BARCELONA.—La Komerca Ĉambro de la kataluna ĉefurbo, sciigata de K. E. F. pri la decido de la Komerca Ĉambro de Parizo rilate la instruadon de nia lingvo, decidis en sia kunsido okazinta la 5.^{an} de Majo esprimi ankaŭ la deziron ke Esperanto estu disvastigata, ĉar ĝi povas faciligi la internaciajn komercajn rilatojn. Tia decido estis afable komunikata al la Sekretario de «Kataluna Esperantista Federacio» kaj publikigata sur la Barcelonaj ĵurnaloj.

—La 1.^{an} de Majo, la anoj de «Aplec Esperanta Grupo» el Sabadell, akompanataj de multaj Barcelonaj esperantistoj, efektivigis interesplenan viziton al nia II^a Specimena Foiro. Vizitinte ĉiujn instalaĵojn, la ĉeestantoj iris saluti la Sekretarion de la Foiro, S-ro Frederic Pujulà, dum multaj jaroj ĉefa pioniro de la kataluna esperantista movado, al kiu oni dankis lian helpon por akceptigi Esperanton de la Foiro kaj lian komplezemon kaj ĝentilecon rilate la nunan viziton. Tre kuraĝigaj vortoj estis interŝanĝataj, precipe pri la tasko farota dum la venonta Foiro kiu eble fariĝos internacia, kaj la samideanoj sin adiaŭis de S-ro Pujulà kun granda entuziasmo, ĝojaj pro la bona akcepto. Dum longa tempo aŭdiĝis tra ĉiuj lokoj de la Foiro nia kara lingvo, ĉar en tiu tago estis permesata la eniro al ĉiu kunportanto de la verda stelo, taŭga kiel invitilo.

MANLLEU.—La Grupo «Esperantista Amikeco» elektis en sia lasta kunsido la jenan Komitaton: Prezidanto: S-ro Jaime Fluvià; Kasisto: S-ro E. Castellnou; Sekretario: S-ro J. Terricabras. La nuna sidejo de la Grupo estas: Pl. Bernardi, 10, ĉe la «Societo de Fiŝkaptistoj», kiu tre ĝentile akceptis la samideanojn. Gvidas kursojn S-roj Ramón Espel kaj Bonaventura Noguer. Belega literatura kaj muzika vesperfestado okazis la 17.^{an} de Aprilo, ĉeestata de distingindaj personoj el la loka loĝantaro kiuj tre agrable konstatis la belecon de Esperanto. Finiĝis la festo per propagandaj paroladoj de S-roj B. Noguer kaj Joan Campdelacreu. Nia kara samideano Campdelacreu, kiel urbkonsilanto, esprimis la aliĝon de la Urbestro al la esperantista agado kaj proponis ĝian koran helpon.

PALAFRUGELL.—Sur la ĵurnalo «Baix Empordà» aperis grava kaj lerte verkita artikolo de samideano F. Viver, pri Esperanto kaj ĝia nuna stato en la mondo. Certe tiu artikolo estis tre efika por nia propagando.

—Ĉe «Ateneu Palafrugellenc» oni faras preparajn laborojn por la starigo de nova Esperantista Grupo.

MATARÓ.—Sur «Pensament Marià» aperis ankaŭ bela artikolo por propagando de Esperanto. En la «Piaj Lernejoj» komenciĝis speciala kurso de nia lingvo, ĉeestata de multnombraj lernantoj, sub la gvidado de R. P. Miquel Soy, Skolapiulo.

GIRONA.—Sur la ĵurnalo «El Autonomista» daŭrigas la serion de siaj propagandaj artikoloj nia amiko S-ro Conrad Domènech. Ili atentigas ankaŭ la enurban publikon pri la okazo en Girona, dum venonta Oktobro, de la IX.^a Kongreso de Katalunaj Esperantistoj. Grupo «Ĝirona Espero» daŭrigas sian gravan laboradon. En kiosko el la «Rambla Alvarez» oni vendas la ĉiusemajnan ĵurnalon «Esperanto Triumfonta».

VALENCIA.—En la «Vegetarana Societo» gvidas novan kurson nia kara samideano Fernando Soler. Li kaj aliaj penas por restarigi ankaŭ en Valencia la esperantajn societojn.

VILANOVA I GELTRÚ.—La 15.^{an} de Majo alveturis tiun urbon samideanoj Gili, Pellicer, Amades kaj Grau. Ili intervidiĝis kun S-ro Gustau Galceràn kaj F-inoj Eulalia kaj Teresa Rosell, kiuj fervore celos revivigi la lokan Grupon kaj varbi novajn federacianojn. Ni esperas ke niaj eminentaj geamikoj el Vilanova baldaŭ sukcesos.

EKSTERLANDA MOVADO

La X^a Internacia Konferenco de la Ruĝa Kruco en Genève alprenis en sia plenkunsido de 7 aprilo jenan rezolucion, laŭ propono de la ĉina delegito S-ro D-ro Wong :

Konsiderante, ke la malfacileco de la lingvoj malhelpas sufiĉamaniere la realigon de la internacia idealo de l' Ruĝa Kruco, ĉu en la verko de helpo sur la batalkampoj, ĉu en tiu de la militkaptitoj, ĉu eĉ en la kongresoj de la Ruĝa Kruco, —

la X^a Konferenco invitas ĉiujn organizaciojn de la Ruĝa Kruco kuraĝigi al la lernado de la helpa lingvo Esperanto inter siaj membroj, precipe inter

la junulaj sekcioj, kiel unu el la plej potencaj rimedoj de internacia interkonsento kaj kunlaboro en la sfero de l' Ruĝa Kruco.

La propono de la ĉina delegito estis subtenata de la serba, germana, pola kaj svisa delegitoj.

Jen nova venko, pri kiu ni povas vere ĝoji.

—La Ĝenerala Asocio de Inĝenieroj de Publikaj Laboroj kaj de la Ŝtato, kaj tiu de Inĝenieroj de la Pariza Urbeŝtaro, ĵus decidis :

«Ni estas konvinkitaj, ke akcepto de helpa lingvo Esperanto por la internaciaj rilatoj havos gravegajn sekvojn, speciale de la vidpunkto de la progreso de la tekniko, permesante vastigi la konon pri la franca tekniko ekster Francujo, kaj sekve, vastigi la agadkampon de la francaj teknikistoj alilande.

Ni voĉdonas :

1.^e Ke oni enkonduku instruon de ĉi tiu lingvo, majstra verko pro logiko kaj simpleco, almenaŭ fakultative, en la programoj de la publikaj lernejoj kaj en tiu de la teknikaj kaj specialaj lernejoj;

2.^e Ke, por la internaciaj Kongresoj, ĝi estu adoptata kiel oficiala lingvo, samrajte kiel naciaj lingvoj, ĝis kiam la sperto konfirmu ke ĝi estas kapbla esti la sola oficiala lingvo;

3.^e Ke la direktoroj de teknikaj kaj sciencaj eldonejoj kaj Revuoj atentu pri la profito de ili atingota per uzo de ĉi tiu lingvo por siaj eldonataĵoj destinataj al aliaj landoj;

4.^e Ke, dume, la teknikistoj sin metu en kondiĉoj utiligi ĉi tiun lingvon por siaj rilatoj kun fremdaj kolegoj, kaj konigu al ĉi tiuj tuj, ke ili estas pretaĵ uzadi ĝin;

5.^e Ke la Asocioj de teknikistoj entreprenu formadon de vortaroj pri siaj specialaj fakoj teknikaj esperante.

Pro ĉi tiu lasta punkto, la du Asocioj nomis Komisionojn por fari ĉi tiun laboron.

—La 10^{an} de aprilo la Kremona Esperantista Grupo organizis solenan kunvenon en Teatro Ponchielli (la plej vasta de la urbo).

Ĉeestis kelke da miloj da Kremonanoj el ĉiuj klasoj kaj partioj kiuj varme aplaudis A. Mandelli, prez. de Kremona Esp. Grupo, D-ron A. Filippetti, urbestron de Milano, komandanton A. Alessio kaj pastran moŝton prof. Carolli.

Oni voĉdonis unuanime jenan tagordon : «La popolo de Kremona sole ne kunveninta en Teatro Ponchielli aliĝas Esperantismon kaj bondeziras baldaŭan enkondukon de Esperanto-instruado en la publikaj lernejoj». Tre favora estas la urbeŝtaro.

Detalan informadon pri eksterlanda movado ni daŭrigos en la venonta numero.

Bibliografio

VIVO DE ZAMENHOF, aŭtoro Edmond Privat, eldonita de Brita Esperanto-Asocio, 1920. — Kvankam multajn belegajn verkojn ĝue mi legis, kiujn oni povas citi kiel pruvojn de la brila vivo de nia lingvo, mi devas deklari ke neniu impresis min tiel profunde kiel VIVO DE ZAMENHOF de Edmond Privat. Pli indan fundamentan ŝtonon ne povus esti elektinta la Brita Esperanto-Asocio, sur kiu bazi la gloran monumenton al Bolingbroke-Mudie entreprenitan de la Brita Esperantistaro per eldono de serio da bonaj esperantaj verkoj.

La reliefa signifo de Edmond Privat en la literatura kampo de nia lingvo liberigas min el la devo recenzi la verkon laŭ la lingva, stila kaj literatura vidpunktoj. Ĉiu esperantisto ja scias ke Edmond Privat estas unu el niaj plej gloraj literaturistoj kaj tial VIVO DE ZAMENHOF, ĉar lia, nepre devas esti verko literature belega, stile ĉarma kaj alloga, lingve perfekta. Tiela ĝi estas.

Sed ne tiom ĝia literatureco estas alloga kiom la fervora fideleco kun kiu la talenta aŭtoro ame skizas la genian figuron de la Majstro kaj la kortuŝanta esprimmaniero per kiu li penas supermontri la ĉefan Zamenhofan vivcelon, kies estas lingvo internacia nura pero, kaj sukcesas atentigi la leganton pri la *interna ideo de Esperanto*. Leginte tiun verkon, oni sin sentas ne nur esperantisto sed ankaŭ homarano.

Ĉiu esperantisto devus legi kaj relegi la VIVO DE ZAMENHOF: literaturamantoj por la plezuro ĝui ĝian fluan, brilan, belstilan Esperanton, kaj la propagandistoj por sin saturi je l' fervoro, konstanteco kaj sindonemo de Zamenhof, tiel majstre elmontritaj de Edmond Privat, kiujn postulas ilia apostolado.

KATONO



Dum la kompostado de tiu ĉi numero okazas en Zaragoza la Dua Diskuta Kunveno de Esperantistoj de Iberiaj Landoj pri kiu ni raportos en venonta numero.



ESPERANTAJ GAZETOJ

ricevitaj en nia Redakcio, publike legeblaj ĉe la legoĉambro de «Enciklopediá Popola Ateneo», Carme, 30, sidejo de K. E. F.

Franca Esperantisto

Le Monde Espérantiste

Esperanto-Praktiko

Itala Esperantisto

La Marto

La Semisto

Germana Esperantisto

Hispana Esperantisto

Internacia Komerca Revuo

Esperantista Laboristo

Kristana Espero

Verda Utopio

Vegetarano

Espero Katolika

Homaro

La Esperantisto

La Laborista Esperantisto

Esperanto

Hungara Esperantisto

Esperanto Triumfonta

Nova Tempo

Literaturo

Portugal Comercial e Industrial (Esperanta Fako)

The British Esperantist

Nederlanda Esperanto

La Verda Ombro

Amerika Esperantisto

Ni dankos sendadon de la ceteraj esperantaj gazetoj.

ANONCETOJ PRI KORESPONDADO

S-ro Fausto Mendiri, Cabras, 7, 2.^{on}, Barcelona, il. pk.

S-ro Isidre Torrents, Mallorca, 558, 3.^{er}, 2^a, Barcelona, 1. kaj il. pk.

S-ro Artur Domènech, Cabanyes, 81, 1.^{er}, 1.^a, Barcelona, leterojn kaj pk. kun rusaj ruĝuloj.

Ĉiu esperantisto devas posedi la faman verkon de D-ro Edmond Privat,

VIVO DE ZAMENHOF

AGENTO POR KATALUNUJO:

Esperanta Societo "PACO KAJ AMO"

STRATO ASTURIAS, 1 — BARCELONA

PREZOJ } Broŝurita. . . . Ptoj. 4'00 — Aŝfrankite 4'50
} Lukse bindita. > 6'50 — > 7'00

Speciala rabato al Grupoj kiuj mendos almenaŭ dek ekzemplerojn.

Poŝtmandatojn oni adresu al S-ro

LLUIS DOMÈNECH, strato Laforja, n.º 51 — BARCELONA

ESPERANTO TRIUMFONTA

ĈIUSEMAJNA ĴURNALO

nur esperante redaktata, kun interesaj
sciigoj pri la esperantista movado.

Eldonanto TEO JUNG

KÖLN - HORREM

Germanujo

POŜVORTARETO

ESPERANTO-CATALÀ
CATALÀ-ESPERANTO

Restas nur 100 ekzempleroj.

Se vi ne ĝin havas ankoraŭ, mendu
ĝin tuj al K. E. F.

PREZO: PTOJ. 0'50

(Al la Grupoj 20 % da rabato).